# Heroldo de Esperanto

97 jaroj
Fondita en 1920

Ni pripensas la mondon

€5,00
R$16,00

ISSN 0018-0823

www.heroldodeesperanto.com | N-ro 3 (2270) — 93-a Jarkolekto | Fondita de Teo Jung en Kolonjo (Germanio) | Eldonata en Trindado - GO (Brazilo)




# Spegulo fariĝas kvarpaĝa kajero

**ARTO KAJ KULTURO EN HEROLDO DE ESPERANTO**

La unuan fojon Spegulo aperas kiel planite: kiel kvarpaĝa kajero de arto kaj kulturo. Ĉi-numere estas plia artikolo por definitive klarigi la trajtojn de Spegulo kaj orienti la verkemulojn pri ĝiaj redakciaj gvidlinioj. César Dorneles debutas per sia leĝera rubriko “Jes, ja”. Krucenigmo kaj enigmoj, artikoloj de Flávio Fonseca kaj Massimo Acciai Baggiani, traduko de rakonto el la itala literaturo fare de Carlo Minnaja kaj vitrino por poetoj (nun kun Evgenij Georgiev) kompletigas la enhavon de la 1-a numero de Spegulo kiel kajero. Per ambiciaj celoj ĝi ensaltas la vojon de strebado por fariĝi zenito sur la kampo de arto kaj kulturo en la Esperanta gazetaro **pp. 2 ĝis 4 - Spegulo**

## Lingvio



## Bonlingva pajlohomo severe atakita

*Inter skemismo kaj naturalismo*, artikolo de Fernando Pita, estis rebatita de Marcos Kramer per la artikolo *Bonlingva pajlohomo severe atakita*. La reago de la bonlingvula akademiano montras, ke la diskuto pri la principoj de la bona lingvo de Claude Piron estas eble la nova batalo kiu anstataŭas la batalon pri ata/ita. Lingvio estas malfermita por la debato. **pp. 13 kaj 14**

## Scienca Heroldo

*Reduktiĝo kaj elmergiĝo*, artikolo de Carlo Minnaja, matematikisto, pri temo de fiziko, okupas tutan paĝon. Scienca Heroldo, de nun tutpaĝa, gastigas longan artikolon, sed prioritate aperos pluraj pli mallongaj tekstoj. En ĝi nepre estos loko por du aŭ tri mallongaj artikoloj kaj kelkaj gravaj novaĵoj rilate la fakan agadon en Esperantujo sur la kampo de scienco. **p. 11**



## INTERVJUO

Bruĉjo Kasini, tre konata itala esperantisto, fondinto kaj direktoro de Edistudio, fariĝis redakcia sekretario de Heroldo de Esperanto. Li estas plia italo en la kunlaborantaro, sed kiel sekretario li partoprenas la redakcian stabon. Ekkonu la ideojn kaj la kialojn por lia engaĝiĝo en la redakcion de Heroldo de Esperanto.
Ĉar li estis intervjuita de la redakcia direktoro de Heroldo, la rezulto montras interesan debaton pri la novaj trajtoj de la gazeto fondita de Teo Jung. **pp. 4 kaj 5**



**SERIO MEMORINDAJ ESPERANTISTOJ**

Alice Herz, estas ĉi-foje la protagonisto de tiu ĉi serio verkita de Xavi Alcade. **p. 15**

**NEŬTRALECO EN ESPERANTUJO**

Malfermita la ĝisdatigo de la debato pri la temo “Neŭtraleco de Esperanto” **p. 2**

**ĈINIO**

Alessandra Madella raportas pri 1000 gelernantoj ĉe la Artkolegio de Kunming Scienca Heroldo **p. 12**